

Piloto serĉas aviadotrafikan kontroliston

Jen nova eldono. Daŭris preskaŭ kvar monatojn ekde la pasinta – do iomete pli ol bezonata por kvaronjara eldono. Montriĝas, ke la redaktado – ĉefe la kunordigado de la revizia kaj provlega procezoj – por kvaronjara revuo iomete superpostulas mian energibuĝeton, vidante, ke mi faras tion apud mia kvardekhora laborsemajno en mia mongajna profesio kaj miaj muzika agado kaj instruado de Esperanto en la universitato de Stuttgart. Ĉiuj tiuj agadoj gravas por mi kaj mi ne volas pri unu el ili rezigni. Tio signifas, ke mi tamen daŭrigas la redaktadon de Scienca Revuo klopodante atingi kvaronjaran eldonon, kiu kontentigas miajn dezirojn pri kvalito.

Kore bonvenus helpo. Dum mi diris tion jam ekde mia komenco de la redaktado de Scienca Revuo, pli kaj pli klariĝis, kia helpo pleje helpus. Tio estas kunordigado de al tuta procezo de publikigo. Iu, kiu disdonas reviziajn aŭ provlegajn taskojn, memorigas la reviziantojn aŭ provlegantojn, disdonas limdatojn por ĉiuj kunlaborantoj. Tian kunordigan laboron mi persone ne tiom bone kapablas, ĉar mi estas iomete nerdeca laboranto, kiu emas enfosi sin en siaj laboroj kaj ne tiom emas kunordigi la laboron de teamo aŭ eĉ pli loza grupo de kunlaborantaj homoj. Mi estas pli piloto ol aviadotrafika kontrolisto. Do aviadotrafika kontrolisto ankoraŭ bezonatas por kunordigi la aviadon. Mi ŝatas plenumi defiajn taskojn pli ol kunordigi la plenumadon de taskoj.

Do nun ankaŭ iomete pri la revuo mem. En la nuna eldono ni denove havas teme diversajn artikolojn. Denove estas artikolo pri kormalsano. Tre interesa artikolo pri la evoluo de la Tero taŭgas por altnivela scienca debato, ĉu la Tero estas kvazaŭ steleto, kiu funkcias simile kiel la suno. De la jam anoncita nova iniciato de TEJO, la komisiono pri scienca kaj faka agado, rikolteblas unuaj fruktoj, nome helpilo por verki sciencajn artikolojn. Nepra legaĵo por estantaj aŭ estontaj aŭtoroj de Scienca Revuo.

Bonan legadon.

Ludwigsburg, aprilo 2014

Johannes Mueller